

Rio Esperantista

Oficiala Organo de Asocio Esperantista de Rio de Janeiro

PENSO KAJ LABORO POR LA UNIVERSALA FRATECO

ALDO O. DOBLAS
Direktoro



SYLLA M. CHAVES
Sekretario



DELIO P. DE SOUZA
Administranto

JARABONO
Eksterlande — Cr\$ 30,00
BRAZILU — Cr\$ 15,00

RIO DE JANEIRO, JUNIO-JULIO 1947

Redakcio kaj Administrejo
R. das Marrecas, 19, 2.^o and.
Tel. 42-5731 — C.P. 3677

Aŭ 25 Respondokuponoj

JARO I

Monata eldono

N.^o 3-4

Ekzemplero — Kr\$ 1,00

NEUTRALECO

Sur neŭtrala lingva fundamento,
Komprenante unu la alian,
La popoloj faros en konsento
Unu grandan rondon familian.

Zamenhof

Feliĉe ĉiuj klubo kaj grupoj esperantistaj obeas la neŭtralecon de Brazila Ligo Esperantista, kaj enmetis rilatan paragrafon en siaj statutoj.

Statuto de B.L.E. diras en la 2^a paragrafo: "Brazila Ligo Esperantista, en la limoj permesataj de la brazila leĝaro, estas neŭtrala rilate al nacieco, raso, religio, politiko kaj sociaj demandoj". Sed ni opinias, ke estas necese, ke ni ĝuste komprenu tian neŭtralecon, kaj agu laŭ tia kompreno.

Tia neŭtraleco ne intencas malpermesi, ke ĉiu esperantisto obeu lian religion, nek estu ano de iu ajn politika partio. Tia neŭtraleco ne intencas malpermesi, ke esperantistoj alinaciaj partoprenu nian movadon, ĉar brazila movado estas parte el tutmonda movado, kaj esperantitoj, inter ni, ne havas propran naciecon, ĉar nur unu superan patrojon ni havas: Esperantujo.

Tia neŭtraleco ne malpermesas, ke ni estu tia, kia ni estas; ke ni agu tia aŭ alimaniere. Ĝi celas nur unuecon en nia movado. Ĝi celas nur, ke ni disputu en Esperantujo, pri primalgrandaj kaj primalgravaj aferoj. Ja nia unueco estas pli grava, ĉar ĝi estas la unua ŝtupo al unueco de la tuta homaro, kiam "la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian". Certe kiam ĉiuj homoj estos esperantistoj; kaj tiu tempo estas tre proksima.

Tamen, ni bezonas gran-

ESPERANTO-MOVADO

La nuntempa homaro vidadas unu el la plej eksterordinaraj movadoj registritaj de l' universala historio: la Esperanto-movado.

Ĉi-tiu movado, ĝisanta ĉiujn landojn, urbojn kaj vilaĝojn, solidiganta amikecojn kaj disdonanta kulturon inter la diversajn popolojn de l' mondo, sen rasa, kreda aŭ politika prijuĝo, ĉi-tiu movado tiom bonfaras por la homoj, ke hodiaŭ ĝi estas de ili plejvarme laŭdata.

La "arbaro da ekzemploj", kiun komercrilate la Esperanto-movado nin oferas, klare pruvas, ke tre utilos kaj efikos la uzado de Esperanto ĉe niaj importaj kaj eksportaj firmaoj, kiel jam okazas en la tuta Eŭropo ĉe centoj da similaj firmaoj, kiuj uzas la Zamenhofan lingvon en siaj komercaj interrilatoj.

Estas klare, ke patralingve ni povas esti komprenitaj en nia tuta grandega teritorio, kaj eĉ post la plej granda parto de niaj landlimoj, ĉar tie la parolata idiomo estas la hispana tre simila al nia portugala.

Tamen en Eŭropo okazas la kontraŭo: se oni transiru ajn nacilimon, oni trovas aliajn morojn, aliajn popolojn kaj do alian lingvon; tial Esperanto estas pli konata kaj pli uzata.

Malgraŭ tio, nia patrujo marŝas en la antaŭgvardio, inter la ĉefoj de l' movado. Inter ni la Federacia Distrikto havas la gloran ĉefi tiun movadon tiel belan, kiel utilan.

La mondo bezonas interkomprenon, bonvolon, pacon kaj fratecon; tio ĉi estas la nura politiko uzata de l' esperantistoj, kaj neniam la mondo ĝin necesis tiom, kiom nun.

Tamen la internacilingvo Esperanto ne limiĝas al komerco kaj literaturo: estas grupoj, kiuj ĝin uzas por diskoni siajn politikajn aŭ religiajn idealojn; tamen tiuj grupoj ne estas filiiĉintaj al la vera Esperanto-movado, ĉar ili kontraŭas ĝian principon: "por ĉiu popolo nur du devigataj lingvoj — la natria kaj Esperanto". La disvastigo, kiun Esperanto akiris nuntempe, ebligas tiom da progreso, ke pli baldaŭ ol oni atendas la laboroj komencitaj de Zamenhof koroniĝos per sukceso. Ĉiĉefurbe, ekzemple, ni rimarkas la promesantan kreskon de l' Esperanto-movado. Tio pruva la efikon de la metropolaj asocioj en iliaj laboroj.

dan kontrolon al ni mem, por ke ni ne tro influu la ĉiun, kaj iĝu ĝi laŭ ni. Ekzemple: katolikistoj povas ĉesti meson ĉiudimanĉe, povas okazigi meson intence je animo de mortintoj, esperantistoj aŭ ne; sed li tute ne rajtas igi la klubon okazigi meson je animo de mortinta esperantisto, same kiel spiritistoj, klubgvidanto, ne rajtas igi la klubon okazigi kunvenon por paroli al animo de esperantisto. Kial? Ĉar tio dividas la movadon. La katolikistoj ĉeeston la meson, unuakaze, sed nekatolikistoj ne, spiritistoj partoprenas la kun-

venon, sed nespirtistoj ne. Iom post iom, la klubo sin dividas, kelkaj foriĝas el ĝi, aliaj laboras solaj, kaj Esperanto-movado perdis ĉiam. Ni bezonas profiti la kunhelpon de ĉiuj laboremuloj kaj sindonemuloj. Tial ni devas surmeti Esperanton sur ĉio alia.

Tiel agante, ni povos cincero kaj konscie kanti nian himnon, kaj interalie: Nia diligenta kolegare En laboro paca ne laciĝos Ĝis la bela sono de l' homaro Por eterna ben' efektiĝos.

H. M.

O ESPERANTO

Por ARY VEIGA SANHUDO

Desde aquela historia fantástica da famosa Babel, que o homem vem procurando, em algumas arremetidas consideradas usadas, estabelecer uma lingua comum para todos os seus semelhantes. E, para termos uma idéia de quão grande esforço tem ele empregado nesta tarefa, basta que se diga como palida ilustração, que mais de duzentos idiomas já foram propostos!... Desta maneira, o problema andou bailando até ins do século passado, quando surgiu muito timidamente, grande solução: o Esperanto.

Esta lingua auxiliar artificial, apareceu num trabalho firmado sob o pseudonimo de Doktoro Esperanto (o que espera), daí o seu nome. Naquela época, precisamente naqueles dias, uma outra lingua também artificial, o Volapuck, creada pelo mosenhor Schleyer, achava-se no mais expressivo apogeu. Até essa altura, porém, muitas proposições surgiram e desapareceram, desaparecendo desapareceram. Todas as hipóteses até então ventiladas ardorosamente, foram pouco a pouco, já pelas impossibilidades que lhe eram inerentes, já pelas multiplas dificuldades apresentadas, completamente esquecidas dos mais fervorosos adeptos a uma lingua unica.

Em verdade, a questão andou parecendo praticamente irrealizavel, pois, pairava ainda no ar inumeras duvidas, desafiando o genio e talento de quantos se haviam debatido para soluçona-la. Leibnitz, o filosofo e matemático alemão, considerado "a ultima enciclopedia ambulante", foi indubitavelmente, um dos sabios que mais se preocupou com a adoção de uma lingua unica, que abrangesse todo o orbe terrestre. Por isso, os

(Continúa na 2.^a pág.)

O ESPERANTO

(Continuação da 1.ª pág.)

seus contemporaneos o cognominaram de pae da ideia de uma lingua universal. O mais interessante, é que o Volapuck, parecia estar fadado a resolver o problema, quando exatamente, demonstrou-se pelo seu primeiro Congresso, falho e de maneira impratico no falar. Foi, justamente, neste particular tão capital, que a lingua ideada pelo Dr. Lazaro Zamenhof, revelou-se singularmente superior a todas aquelas que já haviam procurado solucionar a questão. Nos primeiros momentos daquele celebre Congresso, em Boulogne-sur-Mer, no ano de 1905, esta lingua artificial do medico polonês, evidenciou-se admiravelmente pratica e facil para a conversação. Isto lhe valeu, desde logo, uma inegualavel popularização em todos os recantos do mundo. Nesta memoravel reunião, ficára, pois, demonstrado que o Esperanto, não só era possivel ser falado fluentemente, como ainda do mais pronto entendimento. Estava, como se pode verificar, virtualmente resolvida uma questão que seduzira Descartes, e mesmo o proprio e grande Aristoteles.

A primeira vista, pode-se julgar o Esperanto, como uma inovação a mais de algum genio extravagante; a verdade porém é que ele começa a resolver um magno problema para o genero humano, si considerarmos as inumeras alternativas, que em principio foram meticulosamente ventiladas pelos mais doutos sabios.

Vejam os, pois, para maiores esclarecimentos, de quanto se tem procurado estudar essa questão filologica de ambito extra continental. Eis, sem maiores pormenorizações que as necessarias, as três principais propostas mais cotadas entre os entendidos. A primeira, e esta desposada pelos filosophos e cientistas mais eminentes, fóra a indicação do Latim. Ora, esta lingua morta, é de veras difficil e complicada, como todos nós sabemos. Daí então, as mais cerradas objeções. Mas quando se lhes apresentarem a impossibilidade da lingua de Cicero tornar-se acessivel a maioria das massas; refutaram os interessados, dizendo que este idioma servira aos eruditos na Idade Media para difusão dos conhecimentos humanos. A segunda, esta visivelmente mais pratica do que a primeira, apresentava a hipótese da universalização duma lingua viva. E finalmente, a terceira, que levan-

ta a ideia genial de uma lingua auxiliar artificial. Está claro, que a primeira destas hipóteses circunscreeveu-se a um numero bastante diminuto de idealistas, e verdadeiramente, não podia ir longe immediato, inequivocas lacunas para uma ampla divulgação mundial. Uma delas, é a difficuldade natural para a aprendizagem de qualquer lingua viva, hoje conhecida. Couza, aliás, que não se verifica no Esperanto, graças a simplicidade das suas 16 regnhas, redondamente sem excepções. Ao caso da lingua viva escolhida, agrava-se ainda, o ponto de vista psicologico, de que o idioma vitorioso, sensibilizaria os animos nacionalistas das demais linguas preteridas. Isso, evidentemente, sem considerar as imensas vantagens morais e materiais que reverteriam à nação que tivesse a dita de ver o seu idioma extensivo aos outros povos. Portanto esta hipótese, por circunstancias estribadas na conveniencia humana, ficou desde logo, totalmente excluida. Depreende-se daí, que somente uma lingua independente e de simples manejo podia triunfar. Em verdade, este era o caminho aberto e exclusivo para ascensão da lingua artificial da estrela verde!

O Esperanto, é de percepção rapida, pratica e firme. Acresce ainda a seu favor, que efetivamente não se fundamenta em nenhuma lingua, e é constituido, ao mesmo tempo, de todas as linguas modernas. Nos ultimos seculos, encontrou-se realmente serias difficuldades para o estabelecimento de uma lingua comum, dado ao fato de alguns filologos sofisticos, interpretarem o aparecimento duma lingua geral, como substituto ao idioma nacional de cada país. E' muito natural que esse pensamento erroneo, tenha em principio, prejudicado essa tão louvavel ideia, solapando as bases do problema quando este mal surgira e expunha-se praticamente insolavel. Uma vez banidas semelhantes duvidas, o Esperanto, como lingua unanimemente eleita pelos espiritos mais bem intencionados, passou a funcionar no seu verdadeiro papel de lingua internacional.

Deste modo, pois, este meio de entendimento entre os homens, lado a lado com o idioma nacional de cada país, começou a agir como veiculo de aproximação e compreensão entre as mais diferentes nações.

Sem duvida alguma, esta é uma das maiores vitorias do Esperanto, pois, além de au-

xiliar independentemente o trabalho dos homens, instintivamente os confraterniza.

E' facil de verificar que o idealismo desinteressado do Esperantismo, não é uma utopia, uma vez que as suas irrefutaveis realizações, são hoje, concretos monumentos dos espiritos arrebatados pelo pensamento duma lingua auxiliar universal. Para se avaliar o esforço extraordinario destes homens, que enfileiraram-se ao estandarte da estrela verde, basta contemplar essa obra imensa que eles vêm realizando ha 60 anos. Vemos, o Esperanto, agora, com uma literatura propria completamente vitoriosa; e como se isso só não falasse bem alto, os esperantistas ainda podem referir, as suas celebradas traduções das mais notaveis obras da humanidade, como: Homero, Virgilio, Shakespeare, Dante, Goethe, etc.

Os beneficios que o Esperanto está trazendo à humanidade, e que não deixam absolutamente, o mais leve traço de duvida cetica, serão, todavia, mais objetivos, no dia em que esta nobre lingua, conseguir verter nas suas expressões cristalinas, as obras necessarias aos cursos superiores de engenharia, medicina e jurisprudencia.

A necessidade da generalização duma lingua facil como o Esperanto, é bem patente! Ficou amplamente demonstrado pelos sociologos e estadistas mais sagazes, que uma das bareiras mais profundas no entendimento das nações, reside precisamente na questão idiomatica. Ha bem pouco, naquele famoso julgamento de Nuremberg, viu-se o embaraço dos seus componentes, quando das traduções do inglês, do francês, do russo, e do alemão. Ali estava, claramente, o emaranhado e insolavel caso das interpretações linguísticas, onde as quatro linguas disputaram a clareza das ideias, sem contudo, deixar que se lhes escapassem inumeros deslizes nas expressões, ao serem traduzidas pelas demais co-irmãs. A lingua, evidentemente, é o fator mais importante como meio de intercomunicação dos nossos pensamentos e vontades. E, logicamente, exercera sempre extraordinaria-

rio poder em todas as relações humanas. Tolstoy, que cuidou atenciosamente deste magno problema, considerára a lingua de Zamenhof, a mais facil das linguas conhecidas. O seu exito tem sido tão grande desde o seu feliz aparecimento, que até o mais risinho e humorista dos homens. Mark Twain, revelou singular interesse por este idioma, que a "Academia de Ciencias de França" classificou como uma obra prima de logica e simplicidade! E, isto faz-me realmente pensar, que tinha razão o Conde de Afonso Celso, quando escreveu: "Dentro de alguns anos quem não falar nem compreender o idioma internacional, não poderá ser considerado homem culto!" Para todos os espiritos idealistas, o Esperanto encerra verdadeiramente, a chamada palpavel dos ideais de esperança de um mundo melhor e mais compreensivo. Conhecer o Esperanto, insofismavelmente, é caminhar em direção à paz!

Grava Okazontajo

La esperantistoj en la urbo Zaandam (Nederlando) rememoros post kelkaj monatoj la fondon de sia esperanto-unuiĝo "Zaandam Antaŭen" antaŭ 35 jaroj. Kaŭze de tio ili organizos imponan internacian akcepton kaj fest-kunvenon. Ni petas al la samideanoj en ĉiuj landoj, sendu viajn gratulojn al ni kaj petu informojn por eventuale ĝui dum tiu festoj la gastamecon de la Zaandam a enloĝantaro. Zaadamo estas urbo kun 40000 enloĝantoj, tute apud Amsterdam la ĉefurbo de Nederlando. Nia urbo estas la plej granda en la Zaanregio, konata pro ĝia industrio k. t. p. Nia regiono estas tipe holanda kaj oni povas ĉiun horon travivi neniam forge-seblajn momentojn. La geesperantistoj tutmondaj ne hezitu skribi al ni. Ĉio estos respondata.

Nome la komitato :

A. Hazen (komitanino)
Beukenlaan 12 Zaandam
— Nederland.

NOVAJ LI BROJ

Jus alvenis al niaj manoj du novaj verkoj eldonitaj de Portugala Eldona Rondo: "Vivo de Zola" ka "Unua vojaĝo ĉirkaŭ la mondo", de d-ro Augusteno de Silva, tradukitaj de Manuel de Freitas. Ambaŭ, interesplenaj verkoj, estas aĉeteblaj ĉe nia redakcio, kontraŭ pago de, la unua Cr\$ 15,00, kaj la dua Cr\$ 3,00, pli 10% por sendelspezoj. Mensejoj al s-ano Delio Pereira de Souza, Caixa Postal 3677.

LA SPEKTRO DE L' MILITO

ALVOKO AL ĈIUJ VIRINOJ

(El la semajna "Gazeto de Debatoj" (Jornal de Debates) de la 31a de Januaro 1947a, 3^a paĝo, Rio de Janeiro — Brazilo.)

Tradukis ALBERTO BONFIM.
Verkis BRANCA DULCINA,

Ĉiuj virinoj el la tuta mondo, kiuj atingis la grandegan gloron esti patrinoj; kiuj scias, kion tion signifas pri martirigoj, korporetoj, sinoferoj, kaj sindonemo; kiuj spertis la senliman kaj dignigan ĝojon senti tremmoviĝi en la interno de sia estaĵo la semon de nova vivo; kiuj akompanis pere de grandega sknedeĉo la evoluadon de tiu semo ĝis ĝia liberigo el ŝi aliformita en delikatan kaj sendefendan estaĵeton neekzistkapablan for de ŝia senhola ŝirmo aŭ protekto; kaj kiuj ek de tiu kulmina momenteto maldormadoj, kaj ektimoj; kiam komencis novan serion da ĉiuj virinoj, kiuj travivis ĉion tion; kiuj akuzas aŭ akuzis filojn, volas la pacon! Ili postulas kaj necesigas la pacon!

Ĉiuj virinoj konsciaj pri la utileco de sia kunlaborado por la formado de tiu Tuto, kiu nomiĝas Homaro, malamalgas la militon! Kaj iliaj spontaneaj klopodoj dum diversaj jaroj per sinsekvaj laborado kaj sinokupo, helpitaj de l' abnegacio, kiu nur al ili apartenas, nenio signifas dum la milito ekzistos. Ilia granda kompensiĝo estas krom la plezuro esti patrinoj, la justa fiereco plenumi dignesian neanstataŭeblan mision generi la homam specon.

Sed, demandas mi, kiu postsperte parolas, ĉar mi havis la honoron akuzi tri filojn: Kiucele generi ilin, ilin nutri, ilin edukati? Ĉu por ke ili estu devigotaj aliĝi en murdatojn aŭ murdatojn, hombuĉantojn aŭ buĉatojn? La homaro unuanime min respondos: Por ke ili estu honoraj ĝentiluloj, dignaj civitanoj, laŭregulaj viroj, laboremaj, utilaj kaj justaj.

Mi, do, ĝojege diros: estas tiucele ke mi ilin havis, samkiel ĉiuj aliaj patrinoj havis siajn filojn. Estas por tio, ke ni forkreis tian parteton el nia estaĵo; tiusence ni ilin edukis, konsistiginte ilian volforton kaj ilian intelekton.

Jen aperas antaŭ ni l' abomena fantomo de l' milito. Naŭza, senkompata, koleera, kiu forprenas niajn filojn el niaj brakoj, ilin fortrenante al la krimo kaj al la rui-

niĝo. Kaj ni, senpove, vidas disrompitaj frakasigi la filoj de nia juneco, la kroniĝo de nia doloro, la kialo de nia ekzistado!

Ni, per frenezaj rigardoj, ĉeestas ilian fizikan kaj moralan detruon. Tiuj, kiuj sukcesis rezisti kontraŭ la ĝenerala hekatombo, revenos kripligitaj; iuj havante la sannon detranĉita por ĉiam. aliaj portante la cerbkapablon kaj konscion tute misformigitajn, ĉar la milito sufokis ĉiujn iliajn skrupulojn kaj ilin alkutimigis al la plej kondamneblaj agoj.

Post nelonge tiu tuta junularo estos enmarĉata ĝisanimen en profunda kotejo, kies kontakto disolvos iliajn noblajn sentojn, kiujn ni patrinoj kulturis tiel entuziasme.

Tiuj junaj cerboj, kiuj ankoraŭ bezonas stimulon kaj ekzemplon el aliuloj, por ke ili sukcese daŭrigu la malfacilan vojon de l' devo kaj de l' honoro, sorbos la viruson de l' krimo kaj de l' malnoblo. La murdo ne plu ilin terurigos! Ili ne plu povas senti la abomenon de l' ŝtelo, la honon de l' insido kaj la malnoblecon de l' spionagado!

La milito, tiu abomeninda monstro, uzadas ĉiujn ilojn por ektrompi la bonfidon kaj malsperton de tiuj junuloj; ĝi ŝanĝas la nomojn de l' aferoj por endormigi iliajn sengardajn konsciojn. Se kelkiu mortigas aliulon, la tutmondo lin konsideras murdanto. Tamen se li mortigadas centojn da liaj similuloj, la milito titolas lin heroo! Laŭ la unua hipotezo la krimulo estas juĝota kaj preskaŭ ĉiam kondamnata. Sed laŭ la dua, tiu, kiu mortigadas amasmeritas ordenaĵojn, kiel premion pro lia efika detruagado!

La militon nomis la ŝtelon aneksado; la perfido kaj la insido ŝanĝis ilian sencon de malkuraĝo, elprenante la sugestan nomon taktiko; la spioneco, kiu signifas la plej malalta grado de la misuzado de l' konfido, estis premiita sub la pompa nomo Sekreta Servado!

Kia juna pensmaniero sukcesas rezisti kontraŭ tiel radikala renverso de l' ideoj kaj kontraŭ la subtila veneno el ĉiuj ĉi-tiuj sofismoj tiel lertaj kiel malutilaj?

Kial mi daŭrigus havi filon, kiuj estos aliformitaj en profesiajn murdatojn? Kiucele ni fariĝus kunkulpulinoj por tiel grandega monstreco?

Kial oni daŭrigas la faron de militoj? Ĉu por defendo de altaj idealoj, de iu nobla kaŭzo aŭ por plibonigi la vivmanieron de l' estontuloj? — Ne, ĉar la progreso neniam konstruiĝas sur malordo kaj malmoraleco!

Niaj filoj, niaj edzoj, niaj fratoj, tiel kiel niaj patroj, niaj avoj kaj ĉiuj niaj antaŭuloj aŭ posteuloj, viktimoj de l' militoj, mortis, mortas kaj mortos sencele, senmotive, buĉataj krudaĉe kvazaŭ bestaro ĉe buĉejo, satigante la malpuregajn ambiciojn kaj la privatajn interesojn de dekdono da senskrupulaj politikestroj, kiuj stariĝas kiel inciestroj kaj ne hezitas incitegi tutmondajn militojn, ĉar, havante manfortegon, sen konsideras for de l' danĝero. Ne sciante kion signifas patriotismo ili proklamiĝas naciistoj kaj volas, ke siaj patrolandoj estu pli fortaj ol la aliaj, nur por ke ili kaj iliaj intimoj povu sin kredi pli ŝirmataj.

La vera patrioto priokupiĝas pri la feliĉo de sia popolo ne estigas malordojn; ne incitas ofendiĝojn; ne persekutas aliulojn senhalte; kaj ne kreas internaciajn misaferojn.

Sed nenio el tio eniras en pripensemoj de tiuj enrad kaj krimuloj, kiuj, fidante en sia nepuneblo, ne sin reprezentas antaŭ siaj propraj ordonoj por ke oni falĉu militojn da homaj vivoj, bombardu sendefendajn urbojn, detruu malsanulejojn kaj mortigu dormantajn infanetojn!

Pro ilia senkonscio ili daŭras volante eskapi el la respondeceto, kiun alportas la milito per ĝia fatala sekvo: okazontaĵoj tragikaj, senfinaj, neimageblaj! La mizero, l' malsato kaj la malsanoj estas neeviteblaj post tiaj kaktaklismoj tre oportunaj al la disvolvigo de ĉiuj malsanemaj manifestoj, kiuj pereigas la homan organismon kaj malfortigas la estontan generacion!

Oni ne solvos la nunan porpacan problemon, per la kondamno al la mortigo kaj per la pendigado de tri aŭ kvar tiaspecajn malbonfarintojn.

akuzataj je l' abomena krimo esti farintaj la plej monstra el ĉiuj militoj, samtempe absolvante tiom da aliuloj, kiuj apartenis al la sama bando. Oni ne solvos ankaŭ la porpacan problemon per la observado de l' sama politiko de ili observita, persekutante la judojn en Palestino; per la mikado de l' grandaj nacioj en la interna politikaj aferoj de l' malgrandaj nacioj; per la trouzo de l' memforto, hombuĉante sendefendajn popolojn, kiel la nederlandhindojn, samtempe donante premiojn aŭ plenumante ĉiujn dezirojn kaj petojn netolereblan de l' venkitaj kaj perfidaj nacioj, kiuj partoprenis la militegon samflanke de la malamiko. l' homspeco kaj tiele prokrastis la solvan finiĝon ĝian, kaj pligrandnombrigis la viktimojn.

La sociaj problemoj estas tre komplikaj kaj ne povas esti solvataj de malkompetentuloj.

Tiuj ĉi estas motivoj pro kiuj la studentoj ne devas pretendi solvi aferojn, kiujn aliaj patroj kaj instruistoj, pli spertaj kaj pli interesitaj pri solvo, ne ankoraŭ sukcesis solvi.

Tio, kion ili bezonas fari tre konscia, estas klopodi lerni ĝi kaj instruiĝi, por ke estonte, kiam ili plenaĝos, estu pretaj solvi malfacilajn situaciojn, laŭ la necesaj kolekteco kaj pripensado.

Oni ne malpligrandigas in vivmultekoston rompigante la varejojn kaj estigante tumultojn. Kontraŭe! Tiu vivmultekosto nenio estas krom unu el multaj doloraj konsekvencoj de milito kaj de malordo, sub kiu la kolektiveco sufokiĝas.

Por plibonigi la vivon, estas necese antaŭ ĉio eldetru la mortigilojn. Anstataŭ ĉiujn militmaŝinojn per industriaj iloj; por ke la centoj, la miloj la milionoj da brakoj, kiuj nin malprofitas sian agadon kaj elĉerpas sian energion, preparante novan militegon, tiuj laboru por ĝenerala plibonigo, kulturante la grundon; semante, anstataŭ atomobombojn, la tritikon, kiu estas la tuthomara pano, sanigante la teron per kanalo de l' akvofluoj; fabrikante teksaĵojn, kiuj estas la tuthomara

(Daŭrigo en la 4.^a paĝo)

PALACE MÓVEIS

Exposição permanente de Móveis de fino gôsto.

P. M. RAWET & CIA. LTDA.

Praça das Nações, 184 - B ★ R. Cardoso Júnior, 506 - A
Bonsucesso RIO DE JANEIRO Ramos

EL LA TUTMONDA GAZETARO La Spektro...

(daurigo el la 3^a pago)**ESPERANTO KAJ ROTARIO**

Antaŭ kelkaj monatoj mi petis ke Esperantistaj Rotarianoj sendu al mi sian nomon por ke ni aranĝu propagandon favore al Esperanto en Rotariaj Kluboj, sed mi ricevis tre malmultajn respondojn. Mi denove petas ke ĉiu Esperantista Rotariano sendu al mi la jenan informon: nomon, klubon, klasifikon en la Rotari-klubo; C. C. Goldsmith, Sek. de I. E. L., kaj Rotariano.

(El Esperanto Internacia)

★

VINCENT AURIOL**SUBSKRIBIS PETICION POR ESPERANTO**

Inter la subskribintoj de la Petskribo por Esperanto direktota al UNO troviĝas ankaŭ la Prezidanto de la Franca Ŝtato, s-ro Vincent Auriol. Per sia subskribo la eminenta franca ŝtatviro denove dokumentas sian progressemon kaj sian komprenon por la vera bezonoj de la homaro. Imitinda ekzemplo por aliaj!

(El Heroldo de Esperanto)

★

ĈIU JAPANA INFANO LEGOS PRI LA VIVO DE ZAMENHOF

La Japana ministerio por Edukado decidis meti en la legolibron por elementaj lernejoj biografion de D-ro L. L. Zamenhof. La biografion verkis s-ano Mijake Ŝihej, de Japana Esperanto-Instituto.

Tio ŝajnas al ni la plej taŭga metodo, por konatigi jam la infanojn pri tiu granda bonfarinto de la homaro kaj pri lia verko. Tia biografio de nia majstro devus troviĝi en ĉiu elementa legolibro de la tuta mondo.

En multaj urboj de Japanujo okazis Zamenhof-festoj okaze de la datreveno de l' naskiĝo de la majstro; la

radiostacio JOAK (Tokio) disaŭdigis en tiu tago paroladon "Zamenhof kaj Esperanto" de Prof. Nishi, ĉefdirektoro de Japana Esperanto-Instituto, kaj la stacio JOBK (Osaka) disaŭdigis paroladon "Pri-D-ro Zamenhof" de D-ro Yasuda, profesoro de Osaka Imperia Universitato.

(El Heroldo de Esperanto)

★

RICEVITAJN PUBLIKAJOJNNova Sento, n^o 1, marko 1947.O Espiritualista, S. Paulo, número 31, 2^a quinzena de abril de 1947.Heroldo de Esperanto, n^o 7 (1066) 1 aprilo, kaj n^o 8 (1067) 15 aprilo.

O Naturista, maio 1947.

Reformador, abril 1947.

Boletim Espirita, Florianopolis, n^o 12, de 15-5-947, kun artikolo pri Esperanto.

LaFolio, Malmö, Suecia, aprilo 1947, organo de Klubo Esperantista de Malmö.

Esperantista Bahiano, n^o 4/7, aprilo 1947, dediĉata al memoro de Castro Alves, poeto bahiana.

Ricevis kaj dankas ni la jenajn gazetojn kaj revuojn:

Reformador, n^o 3, marĉo 1947, plena je artikoloj pri Esperanto, portugallingve.Tribuna Espirita, n^o 28, marĉo-abril, 1947.Afrika Voĉo, n^o 5, Februaro, 1947.O Espiritualista, n^o 29, segunda quinzena de marĉo ĉo de 1947.

Heroldo de Esperanto, nroj. 4 (1063), 5 (1065), kaj 7 (1066). 15/2, 1/3, 15/3, kaj 1/4/1947.

kiuj enhavas interesajn informojn. Bonega gazeto, aboninda de ĉiu esperantisto.

Boletim Espirita, n^o 11, Florianopolis, kiu enhavas ĉiamdaŭra kolono "Esperanto".O Naturista, Rio de Janeiro, n^o 4, aprilo 1947.Nederlanda Esperantisto, Amsterdam, nroj. 2 kaj 3, 13^a de Februaro kaj 17^a Marto 1947.Laborista Esperantisto, Amsterdam, n^o 4, aprilo 1947.La Folio, Malmö, Svedio, n^o 3 (163), marto 1947.Montara Bulteno, Belo Horizonte, n^o 2, marto 1947.Helena Esperantisto, Athinaj, Grekio, n^o 141-142, Septembro/Oktobro, kaj Novembro/Decembro 1946.Renovigo, Mejiko Meksikio, n^o 84, aprilo 1947.

AŬRORO, Vizovice, Ĉeĥoslovakio, nroj. 1 ĝis 5, marto-junio, ĝis februaro 1947.

Ĉiu asociano povas ilin legi en nia sidejo, kie estas je via dispono.

ŝermo; konstruante hejmojn; utiligante la transporteblecon. Ĉiuj mallevigis la batalpafilojn! Ĉiu kanono estu aliformata en plugilon, kaj la situacio tre pliboniĝos.

Oni ne bezonas esti financisto por ke oni sciu ke la pligrandigo de l' produktado malaltigas la varkostojn.

Sed la terurega vulturo de l' milito ne ankoraŭ satiĝis je homa sango kaj, el ĝia detrua furiozo, superflugas niajn kapojn starante kiel danĝera minaco kontraŭ niaj posteuloj.

Estas urĝe savi niajn filojn kaj la filojn de niaj filoj, al kiuj ni destinis la pian taskon fermi, dum la lasta momento, niajn okulojn lacigitaj de l' plorado kaj de la larmoj, kiujn ni verŝis sur monteĝojn da kadavroj.

Ni kunprenu niajn manojn, virinoj el la tuta mondo! Hieraaŭaj patrinoj, hodiaŭj patrinoj kaj morgaŭaj patrinoj, nediferencigitaj de l' kredo, de l' rasoj kaj de l' politikaj ideoj. Patrinoj en la tuta mondo, ni kune flankflanke starigu senliman rondon, kaj ĉirkaŭu en ĝi ĉiujn filojn el la tuta homaro, kaj ŝirnu ilin kontraŭ la kruela suferego de la nova milito kaj ekkriegu tre laŭte per la tuta forto de nia patrinamo dum restos al ni eĉ unu vivpiro, celante, ke la mondo aŭskultu niajn vortojn: JUSTO! FRATECO! PACO!

Carioca

Aprenda o

ESPERANTO

"SALDOS DE IMPORTAÇÃO"

OPORTUNIDADE que não se repetirá. — LIQUIDAÇÃO definitiva e total de variadíssimo «stock» de utensílios importados da: AMÉRICA, TCHECOSLOVÁQUIA, SUIÇA, etc., tais como: RELÓGIOS suíços das melhores marcas; Artigos religiosos; Finísimos cristais da TCHECOSLOVÁQUIA; Xicaras, Copos, Talheres, etc., Trusses, Colares de Pérolas e grande variedade de bijouterias SUIÇA E AMERICANA. Painéis, Chaleiras, Caldeirões, etc., de AÇO americano INOXIDÁVEL; FERRAGENS - DIVERSAS, martelos, formões, chaves de fenda, serras, cadeados, etc. — Preços de Importação.

Excepcional Condição de Venda

PEDIDOS E INFORMAÇÕES À:

AVENIDA PRESIDENTE WILSON, 198 — SALA, 204

RIO DE JANEIRO

MONATO PROGRAMO

JULIO

- 5 — Kulturkunveno je la 16,30
 7 — Kunveno de Direktoroj
 12 — Tagmanĝo, ĉe "Leiteria e Restaurante Fredileta" — Av. 13 de Maio, 48, 13^a horo
 Inaŭguro de Supera Kurso, 15^a horo
 Kulturkunveno, 16,30
 19 — Kulturkunveno
 21 — Kunveno de Direktoroj
 26 — Kulturkunveno.

SOCIALAJ NOTOJ

Dum la nuna monato festas siajn naskiĝajn datrevenojn la jenaj samideanoj:

- 3 — Leonel Boga Nogueira da Cruz
 8 — Olivio Corrêa Pinto
 14 — Ismael Gomes Braga
 15 — Ariosto Lopes Bernacchi
 25 — Oreste Almada
 27 — Sra. Julia Lobo de Souza
 29 — Haroldo Leite Pinto
 31 — José Francisco de Lima

Notoj de sekretario

La 5an de majo la direktoro ricevis la viziton de s-ano Oswaldo Leite de Moraes, prezidanto de S. Paulo Esperanta Klubo, kaj sekretario de la Organiza Komitato de la 11^a Brazila Kongreso. Laŭ propono de s-ano O. S. Lopes, portempe 1^a Sekretario, la direktoraro ne okazigis la kutiman kunvenon, kaj oni interparoladis pri la movado en S. Paulo kaj Rio.

Okazis dum la monato nur unu kunsido, je la 19^a. Ĝenerala Sekretario s-ano D. Pereira de Souza ĉeestis kaj komunikis sian decidon fini la libertempon, ĉar li jam estis ekŝiĝinta de la posteno ĉe B. L. E. Oni pritraktis la situacion de la gazeto, kaj oni decidis starigi subtenantoj, ĝis kiam ĝi havos sufiĉe da anoncantoj.

La direktoro de Instrua Fakto komunikis al la estraro la baldaŭan inaŭguron de supera kurso. Pro la malsukceso de maja ekskurso, oni decidis nenin okazigi en junio, kaj s-ano Lopes pristudu la eblecon fari balon je la fino de la monato.

LA LIBERTEMPO

Kiam mi forlasis Rion, mia plej granda deziro estis forlasi. Varmon, soifon, ŝviton, urĝon lasi malantaŭen.

La trajno ekkuris. Antaŭurboj en la taglaborfino. Post la kamparoj. La dolĉa verdo kiu ripozigas niajn okulojn kaj animojn.

